

**Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908**



**La Vorto de la Prezidanto**

6an de Aŭgusto 2014

“Karaj geanoj de la Norda Federacio,

Mi esperas, ke viaj someraj tagoj, eble eĉ ferioj, bonege disvolviĝas en gaja, feliĉa kaj eĉ foje familia etoso. Vi certe ripozas sed ankaŭ pretigas vin por nova riĉoplena “lernojaro”, kiu kondukos nin al la “centa” U.K. en Lillo (Lille) venontan Julion.

Kun mia edzino Françoise, ni partoprenis en Montevideo (ĉefurbo de Urugvajo) la I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) Konferencon de la 19a ĝis la 25a de Julio. La temo “Lingvo justeco en praktiko: latin-amerikaj spertoj kaj tendencoj”, kiun pritraktis 79 partoprenantoj el 26 landoj en tre bela domo “Ateneo” centre de la urbo. ILEI elektis tiun urban Montevideo por memorfesti la faman rezolucion de UNESKO favore al Esperanto, kiu okazis antaŭ 60 jaroj dank’ al la mirinda kaj tre efika laboro de Profesoro Ivo LAPENNA el Kroatio. London, la 21 an de Julio, nia tuta grupo estis solene akceptita en la belega kaj impona Leĝa Palaco aŭ Nacia Parlamento, de la urbestro de Montevideo kaj reprezentantino de Unesko.

Sekvo p. 2 . . .

**Vivo de la Nordfrancia Federacio**

**Tutmonda sesio de la KER-ekzamenoj en Araso**



**Sabaton la 17an de Majo 2014** okazis en Araso la tutmonda KER-sesio de Esperanto-ekzamenoj. Jam de tri jaroj Edmond kaj Arlette PLUTNIAK organizas tiun sesion por la membroj de la Norda Federacio.

Denove ĉi-jare okazis la kompletaj ekzamenoj: la skribaj kaj la parolaj partoj, kiuj konsistas el enlaboratoria aŭskultado de tekstoj kaj antaŭkomisiona individua parolado, en la tri niveloj: B1, B2 kaj C1. Gratulon kaj dankon al la tuta teamo de Araso, kiu helpis por instali la tri bezonatajn ekzamen-

salonojn kaj la dumpaŭzan saloneton kun trinkajoj kaj manĝetoj: Claudine ROBBE, Chantal WLODARSKI, Janine RAULT, Jacky RAMON, Didier TOULLER kaj Daniel CALVOS.

Ekde la 8a kaj duono alvenis la 11 kandidatoj, kiuj aliĝis al la

diversaj niveloj de la ekzameno: Agnès JULLIEN, Henri BON, Jean-Louis GRÉAU (el Amiens), Jules LEHU (el Lillo): skriba parto de la nivelo B1. Daniel CALVOS (el Araso): skriba parto de la nivelo B2. Joëlle MULLER (el Araso): parola parto de la nivelo B2. Bernadette MANIER (el Amiens), Gilbert ODDOUX (el Dunkirko), Alexandre ZELAZNY, Daniel MAYEUX (el Lillo): skriba kaj parola partoj de la nivelo B2. Fabrice LEMAIRE (el Araso): skriba parto de la nivelo C1.

Poste okazis tre interesa gvidata vizito de la Palaco, ĉefe de la sidejoj de la deputitoj kaj de la senatanoj de Urugvajo, kun diversaj klarigoj pri la historio, la flago, la blazono kaj la konstitucio de tiu lando de 3 milionoj da loĝantoj. Fine, ni ankaŭ solene plantis arbon en ĝardeno antaŭ la Palaco, kun apuda ŝildo klariganta al ĉiuj preterpasantoj tiun sesdekjaran rezolucion.

Grupe, buse kaj ŝipe ni atingis la ĉefurbon de Argentino, Bonaero, kie okazis la 99a Universala Kongreso de la 26a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto. La temo: "Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco". En tiu "fora" lando de Sudameriko, el 57 landoj aliĝis finfine 694 delegitoj. Kiel kutime, bunta kaj riĉa programo; foje povas esti malfacile elekti inter diversaj samhoraj programeroj proponitaj. Tamen vendredon, okaze de la "venontaj U.K.oj", Xavier **DEWIDHEM** majstre prezentis kaj entuziasme invitis ĉiujn al la 100a UK en Lillo. Lia elstara kaj tre profesia prezentado impresis la ĉeestantaron kaj preskaŭ ĉiuj el la salono deziris jese respondi al la invito. Dank' al invitletero de Xavier al la Ambasadoro de Francio en Argentino, ataŝeino de la franca ambasadejo partoprenis la "Solenan Fermon", sabaton matene. Estis emocia kaj kortuŝa momento, kiam la prezidanto de la Argentina L.K.K. (Loka Kongresa Komitato) transdonis la "Verdan Standardon" al la prezidanto de la franca L.K.K., poste denove Xavier emocie kaj ĝuste parolis. Li ricevis lavangon da aplaŭdoj. Kompreneble, plia jaro da laboro kaj diversaj streĉoj atendas nin!

Por ĝui la etoson kaj eble ankaŭ por pli bone prepari tiun gravan eventon, ne forgesu partopreni la 26an Eŭropan Rendevuon en Stella Plage en la tre bela kaj komforta feriejo Stella-Maris, apud Le Touquet. Ne prete streku sur vian agendon tiun mirindan semajnfino, la 15an kaj la 16an de Novembro! Riĉa programo bonege preparita de Arlette kaj Edmond **PLUTNIAK**, kiujn mi kore dankegas, kaj ne forgesu ke ju pli frue vi aliĝas des pli multe vi helpas niajn organizantojn.

Post la subskribo de la diversaj dokumentoj, la skribaj partoj oficiale komenciĝis. La honora prezidanto, **Marianne DUNLOP**, universitata profesoro pri la ĉina kaj rusa lingvoj, oficiale malfermis la sigelitajn kovertojn entenantajn la ekzamenerojn. Aŭdiĝis la informoj registritaj de **Katalin KOVÁTS** kaj la ekzamenatoj komencis la taskojn sub la kontrolo de **Claude LONGUE-EPÉE** kaj **Katja BOEN**; mi dankas ilin pro ilia ĉiujara efika kunlaborado. Regis en la salono etoso de serioza laboro kaj cerbumado. Tion konstatis kun granda miro la gazet-jurnalisto, kiu diskrete fotis kaj pridemandis por objekte raportoj pri la evento.



Post la skriba parto, la kandidatoj de la nivelo B2 aliris alian salomon, kie akceptis ilin **Edmond PLUTNIAK** kaj **Marianne DUNLOP** por la aŭdiĝo de tekstoj.



Same kiel lastjare, por tiu ekzamensio okazis la perkomputila trapasado de la individuaj paroladoj antaŭ neĉeestanta komisiono de ekzamenantoj. Malgraŭ pluraj teknikaj malfacilaĵoj, ĉio bone disvolviĝis. Feliĉe, ke **Didier TOULLER** dediĉis sian tutan tagon por helpi min prizorgi tiun parton, por foti, por filmi kaj por regule rilati kun **Katalin KOVÁTS**. 5 kandidatoj de la nivelo B2 laŭvice respondis la demandojn de la ekzamenantoj. Matene, **Katalin**

**KOVÁTS** (en Nederlando) kun **Renato CORSETTI** (en itala vilaĝeto), posttagmeze, **Márta KOVÁCS** (en Hungario) kun **Zsófia KÓRÓDY** (en Germanio) pridemandis la kandidat-ojn. Ĉiuj el ili esencis bonegajn strebis kiel eble plej bone respondi, rakonti kaj doni sian opinion. Gratulon al ili! Gratulon ankaŭ al la kursgvidantoj de Lillo, Araso, Dunkirko, kiuj sukcesis instigi kelkajn el siaj lernantoj trapasi la ekzamenojn. Apartan emocion mi spertis, kiam la klubanoj de **Amiens** konfesis, ke ili partoprenis memore al sia sindonema kursgvidanto **Daniel DEVIS**.

La organizo de tiu ekzamensio postulis multe da laboro, ankaŭ multe da streĉo. Tamen la perfekta kaj miriga organizo de **Katalin KOVÁTS**, kiu regule sendis precizajn informojn kaj scipovis sproni kompetentan teamon de kunlaborantoj, ebligis realigi tion.



Mi dankas denove ĉiujn kunlaborantojn kaj ĉiujn el la 11 kandidatoj, kiuj kuraĝe, serioze kaj intense laboris la tutan tagon.

La estro kaj vicedstro de la Kultura Oficejo varme gratulis nin pro la organizo, kaj konsciis pri la graveco de la evento.

Post tiu sukcesa organizaĵo, dum kiu ni amplekse reklamis Esperanton, ni ne maltrafu novan okazon altigi la prestiĝon de nia kara lingvo, partoprenante la Eŭropan Rendevuon la 15an-16an de Novembro 2014 en *Stella-Plage*. Tie, **Katalin KOVÁTS** oficiale enmanigos la diplomojn al la sukcesintoj.

*Raportis Arlette PLUTNIAK*

# La Nordfrancia Federacio en UFE kaj UEA JARA KOMITATKUNSIDO DE UFE EN CHAMBÉRY

Ĝenerala Membrokunveno de la 31-a de Majo 2014.  
Komitata Kunsido de la 1-a de Junio 2014.

La jenaj komentoj pri la debatoj kaj decidoj de la menciitaj kunsidoj rilatas esence al temoj koncernantaj interalie nian federacion kaj ĝiajn membrojn. Kiel kutime nia federacio estas bone reprezentita dum nia nacia kongreso. Eĉ se la redaktanto de ĉi-tiu raporto *Claude LONGUE-ÉPÉE* ne povis partopreni – je sia bedaŭrego, pro personaj malhelpoj – li estas inspirita de la oficialaj protokoloj...

Ĉeestis: *Xavier DEWIDHEM* kaj *Julia HEDOUX*, de la UFE-estraro, intervenantaj pri la organizo de "Lille2015"; *Michel DECHY*, prezidanto de GEE; kaj *Katja BOEN*, kiu reprezentas la federacion... kaj kiu raportas en ĉi-tiu numero de nia gazeto pri la etoso kaj kelkaj komunaj eventoj de la kongreso.

## Ĝenerala Membrokunveno de la 31-a de Majo

Sekve al la Komitata Kunsido de la 30-a de Majo, la Ĝenerala Membrokunveno de la 31-a de Majo kunvenigis 56 partoprenantojn. Prezidis *Axel ROUSSEAU*. Protokolis *Aleks KADAR* helpata de *Xavier DEWIDHEM*.

La agadraporto 2012-2013 estis unu-anime aprobata. La financa raporto estis aprobata de forta plejmulto. Por la renovigo de la komitato estis reelektitaj inter aliaj: *Xavier DEWIDHEM* kaj *Julia HEDOUX* per tre multaj voĉdonoj.

## Financoj

Ok kluboj (eksternordaj) aliĝis per la "Franca Interasocia Kotizo". Laŭ la tarifoj difinitaj de UFE... kiuj ne ekzakte kongruas kun la kotizoj de la Norda Federacio – kiel estis klarigite en antaŭa numero de nia gazeto. Laŭ membraraj statistikoj, el 544 UFE-membroj je la 30-a de Septembro 2013, nur 31 estas Nordfederacianoj.

Tiu nombro estas tre stabila... sed ne sufiĉa!

Ĉi propono de regulaj donacoj je 2€ ĉiumonataj estas afero kiu ankoraŭ lamas.

## Agadoj

### En « Expolangue »

Dum 4 tagoj komence de Februaro deĵoris tuta skipo de ne nur Parizaj volontuloj. La afero estas daŭrigenda. *Michel DECHY* tie deĵoris; li havis kontakton kun instruisto en "Lille 3", kaj tiel li povis prezenti Esperanton en la Lille-a Universitato.

### Pro la balotkampanjo de EDE

Tre plimultiĝis la vizitoj al la retejo de UFE, kaj kontaktoj de ĵurnalistoj al EDE.

Estas enretigita rubriko pri instruado. Ni sendu al *Susanna* en la UFE-sidejo fresajn informojn por la rubriko "L'Espéranto près de chez vous".

### Informoj pri interesaj gazetartikoloj kaj komunikoj

Kiel ni jam informis en antaŭa numero de nia gazeto – Ili estas sendindaj al *François BARTSCH* kaj *Didier LOISON*, pere de la sidejo.

### La letero "Esperanto Aktiv"

estas sendita ĉiumonate al multaj abonantoj (eksam lernantoj, vizitintoj en "Expolangue", ĉiuj UFE-membroj...). Ĝi konsistas el 4 partoj: Kulturo kaj intervjuoj, Kalendaro, "Lu, Vu, Entendu". "Ils l'ont fait dans leur région". Informoj estu sendotaj al [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org).

### La interasocia skribpeticio por "Espéranto au Bac"

Rikoltis 33 000 subskribojn kaj estis prezentita en la Ministrejo... sed sen nuna sekvo!...

## ENHAVO

## ASOCIAJ TEMOJ

Fede ★ Tutmonda sesio de la KER-ekzamenoj en Araso	p1
Fede ★ Jara komitatkunsido de UFE en Chambéry	p3
Fede ★ "Revidi Dinan"	p5
E080 ★ Miguel Á. González Alfonso	p7
E080 ★ "Mia AGORA"	p7
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p8
ArE ★ Lingvo-salono en Béthune	p8
BuE ★ Agad-raporto el Bulonjo	p9
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p9
LVE ★ Agadraporto el LVE	p9
VaE ★ Agad-raporto el Valencieno	p10
VaE ★ Alexandre Denis A. DE PUJOL	p10

*Bonan kuraĝon al ĉiuj, kiuj gvidos aŭ partoprenos la diversajn esperantajn aranĝojn aŭ kursojn kaj dankon al ĉiuj, kiuj starigos budon por tamtami kaj reklami pri nia kara lingvo. La ferioj baldaŭ finiĝos aŭ finiĝis, ek al la laboro, kun granda plezuro!*

La prezidanto *Michel DECHY*



## Por la 100-a Universala Kongreso de Esperanto « Lille 2015 »

kiu okazos de la 25-a de Julio ĝis la 1-a de Aŭgusto 2015 en "Lille Grand Palais", estiĝis temaj skipoj, kiuj kunsidis en Decembro 2013 en Parizo kaj en Aprilo 2014 en Lille. La LKK kunlaboras kun UEA kaj serĉas volontulojn: 60 homoj estas bezonataj por akceptado de la kongresanoj; por ekkursoj same estas serĉataj buŝtradukantoj, ĉiĉeronoj kaj akompanantoj.

Informoj per [www.lille2015.fr](http://www.lille2015.fr)

Kontakto por la ret-kesto:  
lille2015@lille2015.fr

– La akceptantoj de la kongresanoj kaj la ĉiĉeronoj de ekskursoj venu surloke en Lille unu aŭ du tagojn antaŭ la malfermo de la kongreso. La ekskursoj okazos dum, antaŭ kaj post la kongreso. Ili estas antaŭ-viditaj en Parizo, Lille, Amieno, Bulonjo-ĉe-Mar, Bruĝo, Remso, Astérix-parko...

*Katja BOEN* pretas doni klarigojn pri la ekskursoj.

– Por la kultura programo, Simplaj programoj dependos de decido de UEA kaj de kiom da salonoj estos je nia dispono. Estos, kiel kutime, la "Kleriga Lundo". Publikaj spektakloj okazos en Lille-Plage.

– Pri komunikado respondecas *Xavier DEWIDHEM*, *Bruno FLOCHON*, *Cyrille HURSTEL*, *Didier LOISON*. Estas serĉataj 100 patronoj... kaj mecenatoj!

– Pri Infana Kongreseto, *Michel DECHY* zorgas, kaj serĉas helpantojn. Ĝi okazos en *Villeneuve-d'Ascq*.

– Pri la loĝado kaj amasloĝejo, *Michel DECHY* precizigas, ke estas de nun nova junulargastejo.

### Pri la venonta landa kongreso en 2015

La afero ne jam estas difinita. Ĉu ĝenerala membrokunveno en aŭ apud Lille, okaze de preparokunsido de "Lille2015"?

### Pri la kreado kaj eldonado de nova lernolibro

La afero ne multe antaŭeniras!

### Komitata kunsido de la 1-a de Junio

Sub la prezido de *Axel ROUSSEAU*. Ĉeestas de la Norda Federacio: *Xavier DEWIDHEM*, kiel vicprezidanto de la Universala Kongreso "Lille2015"; *Julia HEDOUX*, kiu ankaŭ respondecas pri la organizo de "Lille2015"; *Michel DECHY*, kiel reprezentanto de GEE; *Katja BOEN*, kiel reprezentanto de la federacio kaj ankaŭ kompetenta pri la UK-ekskursa fako.

### Klubo 2000 por 2013-2014

Pri staĝoj de trejnado de ĉiĉeronoj en *Bouesse*. Tiuj jam okazis de la 10-a ĝis la 15-a de Junio en "Kvinpetalo" kun profesiaj trejnantoj. Estas antaŭ-viditaj 2 aliaj staĝoj: unu en Oktobro 2014; alia en Aprilo-Majo 2015. Tiu unua staĝo kostis 2500€. En la kaso de Klubo 2000 restas 650€. *Claude NOURMONT* sendos al *Julia HEDOUX* la budĝeton de la estontaj staĝoj.

### Klubo 2000 por 2014-2015

La fratino de *Yvette VIERNE* proponis 1000€, por financi grandan inform-kampanjon cele al studentoj.



*Bruno FLOCHON* planas videbli Esperanton per varbiloj dum la UK en Lille, kaj post la UK. Por realigi ilin, ni bezonos monon kaj homfortojn, por produkti flagojn, banderolojn, panelojn, ekspozici-materialon. La budĝeto povos esti ampleksa: ĉirkaŭ 5000€, ekster la informado al studentoj. La vasteco de Lille postulas grandan kvanton da afiŝoj. Estas grave havi afiŝojn, por varbi Esperanto-lernantojn.

La komitato unuanime decidas: Klubo 2000 por 2014-2015 estos dediĉita al "Lille2015", informado kaj trejnado.

### Partopreno en la festivaloj "Alternatibaj"

La unua evento okazis en *Bayonne* la 6-an de Oktobro 2013. Jam 36 urboj en Francio decidis akcepti tian eventon. Temas pri ekologio, klimatsanĝiĝo kaj aliaj alternativaj. Indus ke la lokaj kluboj partoprenu tiajn festivalojn. Vidu la nacian retejon: [www.alternatiba.eu](http://www.alternatiba.eu).

### Universala Kongreso "Lille2015"

Jam dum la tuta semajno de la UK 2014 en Bonaero estis budo pri "Lille2015" kun *Xavier DEWIDHEM* kaj *Michel DECHY*. Kaj specifa tablo dum la Movada Foiro.

La unua buteno "Lille2015" pretas je la 15-a de Julio. Estos 10000 ekzempleroj por UEA, 1000 por la UK, 1000 por UFE.

Pri la aliĝiloj al "Lille2015" zorgas UEA. Peros UFE por la francoj.

### Prelegturneoj

*Yves NICOLAS* planas turneojn. *Stano MARĈEK* (slovako) gvidos, kun *Michel DECHY*, lingvan staĝon en *Hérouville* la 18-an kaj 19-an de Oktobro. Post tiu staĝo, li prelegvojaĝos dum 2 aŭ 3 semajnoj. Datoj estas precizigotaj.

### Fête de l'Huma (12-14-a de Septembro 2014)

UFE jam decidis en Oktobro 2013 dediĉi 850€ al FET por "Fête de l'Huma 2014". Ĝi pretas pagi.

### Eldono kaj Butiko

Sensukcesaj kontaktoj al la rajtposedanto de "Lucky Luke".

Sensukcesaj sendoj de manuskripto de "Kumeŭaŭa" al 15 eldonistoj.

Oni vendis ĉ. 700 ekzemplerojn de "Tinĉjo". "La Templo de l'suno" ne tiom rapide vendiĝas kiom ni ŝatus.

Restas la problemo de granda stoko ĉe amikoj de *Michel DECHY*. Estas farota alvoko al Francilio por ne havi ĉiujn albumojn en sama loko.

Laŭ UFE-protokolo verkita de *Alex KADAR*, resumis por la Norda Gazeto: *Claude LONGUE-ÉPÉE*.

# “REVIDI DINAN”

## Raporto de SAT kongreso de Roland PLATTEAU

Esperanto ne estas sekto nek geto ekster la vivo! La historio de Esperanto ĉiuepoke estis en rekta ligiteco kun tio, kio estis okazanta en la mondo.

Do, se ekde la komenco kelkaj pensis igi Esperanton esti la lingvo de la komercistoj, aliaj rapide volis uzi ĝin kiel komunikilon por internacia solidareco de la proletoj. Kaj SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), naskiĝinta (kaj ne naskita, nek naskata!) en 1921, kiel ne pora sed pera asocio, t. e. kiu uzas Esperanton kiel rimedon, por kunigi en ties diverseco ĉiujn maldekstrulajn esperantistojn, estis dum epoko tiom potenca, ke ĝi havis pli da anoj ol la neŭtrala movado mem; en 1933, duono de la germanaj esperantistoj estis komunistoj, sed tiam, kiel ĉiuj scias, komunistoj estis la unua homkategorio kiun **HITLERO** sendis en la koncentrejojn. En Sovetio, estas pli malsimple: la rilatoj de Esperanto kun la komunista movado estas vasta kaj komplika temo; iliaj rilatoj konis, kiel oni diras, “altaĵojn kaj malaltaĵojn” (por detaloj legu la intereseigan libron de **Ulrich LINS**: “*La Danĝera Lingvo*”), mi simple diros, ke post esti uzinta ĝin kiel rimedon de propagando, la Sovetia registaro konstatis – ĉar tiu propagando estis plena je mensogoj! – ke ne estis laŭ ĝia intereso ebligi al la laboristoj Sovetiaj malparan komunikadon kun tiuj de la kapitalismaj landoj! Do, ekde 1937, **STALINO** komencis mortpafigi esperantistojn je diversaj falsaj akuzoj, kiel “spiono”, “teroristo” (jam!).

Nun, post kvereloj, skismoj, repaciĝoj, SAT plu estas, sed kiel aliaj tradiciaj historiaj establoj maldekstraj, ĝi multe ŝrumpiĝis (en 1949 ĝi havis 5 134 anojn, nun 603, el kiuj eble kvindeko ĉeestis en *Dinan*, kie maksimume 48 partoprenis la voĉdonojn), kaj iom forgesis siajn

komencajn idealojn.

Ties diversaj tendencoj, post la pasintaj kvereloj kaj skismoj, nun pace kunvivas en ĝi sub formo de “frakcioj”.

Kaj ĉijare ilia internacia kongreso okazis en Francio, en la bela bretona urbo *Dinan*, malkovrita de mi antaŭ 28 jaroj, kiun mi tial kun plezure revidis.

Mi pensis, ke la plej interesa parto



estos la prelegoj; ne veras.

Interna kongreso de SAT: mi pensis, ke kiel ne SAT-ano mi ne rajtos ĉeesti ilin; ankaŭ tio ne veras, fakte oni ja rajtas! Mi eksciis, ke la ne SAT-anoj povas ĉeesti la laborkunsidojn, nur voĉdoni ili ne rajtas, kompreneble; tiutere mi konstatis, ke la demokratia funkciis, kaj serioze, sine de SAT, kiel dirus **FROSSARD**, la SAT-ana demokratio ekzistas, mi renkontis ĝin. Mi konstatis ankaŭ, ke kaj la prelegoj kaj la laborkunsidoj estis, en ĉi loko, disciplinataj rimede de apero de tri koboldo-bildoj, (bretonaj kompreneble!), verda, oranĝa kaj

fine ruĝa, avertantaj pri la proksimiĝo kaj fino de la planita tempo, kaj tio funkciis! Bonorde! Do mi diligente profitis la okazon, kaj povis malkovri, kiel funkcias interne SAT, (kaj ke personaj problemoj, kiuj laŭdire iam plagis ĝin, ne plu ekzistas) kaj kiuj estas ĝiaj problemetoj kaj problemegoj. Pri ĉio tio mi ne parolos, nek detalos la disvolviĝon, nek la programon (unue ĝi troveblas sur la reto, due, por kongreso ne ONTA sed INTA, kion utilus?)... estus tro longe. Mi nur aludos kelkajn signifopezajn punktojn, elektitajn laŭ mia bontrovo.

Do, mi pluigas, krome kaj krone estas iu distra parto, kaj ŝajnas, ke almenaŭ duono de la partoprenantoj venis NUR por la turisma kaj distra programoj.

Tiu estis ja bonkvalita. Vizitoj, kaj tiuokaze mi konstatis, ke paradokse la ununura momento, kiam mi aŭdis paroli pri klasbatalo, kaj pri la rolo de la tielnomata “tutmondiĝo”, utiligata de la investantoj por maksimumigi la ekspluatadon de homoj kaj siajn profitojn, estis franclingve el la buŝo de la prezentistino en la vizito de ekzistinta minejo de granito en *Le Hinglé*! Cetero mi malkovris, de ties remparoj la belan urbon *Dinan*, kaj perditan

funde de arbaro, fine de longa rubusberoriĉa pado, belegan, sorĉan lokon: <http://lavilleheleuc.fr/> kiu ludonas loĝejojn por turistoj, kaj kiun mi tre rekomendas: tio estas mirinda paradizo! (Kaj mi juras, ke mi ne ricevis ŝmirmonon, nek estas akciulo en ĝi.) Do, en tiu distra parto enestis ankaŭ teatro! Tre originala teatraĵo, pri la imperiestro Karakalo, ege burleska, kaj plena je vortludoj (tiom komplikaj, ke ili ĉiufoje haltiĝis la prezentadon – kun subita rigidiĝo kaj senmoviĝo de la aktoroj dumtempe! – kaj zorge montris la tekston sur ekrano por ke la spektantoj povu

bone kompreni ilin.)

Mi malkovris, ke **Miguel FERNÁNDEZ**, specialisto pri la hispana poezio, kaj mem poeto, ankaŭ scipovas kanti flamenko-stile, tre bele kaj efektive!

Li kantis ankaŭ plurajn hispanajn kantojn tradukitajn esperanten. Unu el ili elvokis Madridon de la 1936-39-jaroj kaj ties popolon respublikistan kuraĝe rezistantan sub la bomboj de la faŝistoj... kanto, kiu certe povus elvoki la aktualiaĵojn! Sufiĉus anstataŭigi Madridon per *Donetsk* aŭ *Lugansk*. Ankaŭ en la prelego mi vidis timigan grafikajn montrantan du kurbojn: tiun de la hektaroj bezonataj por nutri kreskontan homaron, kaj tiun de la restantaj kultiveblaj hektaroj, malaltiĝanta, kaj -ĝonta, pro dezertigo, erozio, subbetonigo, kaj, vi divenis, baldaŭ la kurbojn kruciĝos... En la sama prelego, oni kalkulis, ke pro sia ekonomia kresko, en 2030, la sola Ĉinio bezonos la tutajn de la teraj riĉfontoj... Ne necesas aldoni, ke ni iras rekte al 3-a mondmilito! Kaj tial okazas ekde nun aferoj, kiel tiuj, kiuj okazas en Ukrainio.

Mi eksciis, ke inter la ĉeftemoj de la venontaj numeroj de *Sennaciulo*

estos "Ukrainio", kaj ke pri tio, en SAT, "la opinioj estas diversaj kaj kontraŭaj"; nu, tio mirigas min, ĉar kiel do SAT-ano, kiu ajn estu ĝia tendenco, povus havi bonan opinionon pri la Kievaj puĉistoj: ekstremdeksstruloj senpoviĝintaj helpe de la Usonaj sekretservoj, submetataj al malsocialaj planoj de **IMF**, kaj bombantaj terorisme la loĝantojn de *Doneck* kaj *Lugansk*?

Foje la lingva kono ne estis bona, ekzemple, vidante du virojn sin kisi reciproke por saluto (kio cetere estas, en certaj familioj kaj certaj regionoj, tute tradicia kaj banala), iu mire diris: "Du homoj, kiuj interkisas!". Min ŝokis pigraj francismoj kiel "promocio" anstataŭ akcelo, aŭ "transmisio" anstataŭ transdono.

En la libroservo, mi bedaŭris ne trovi la tre interesajn librojn eldonitajn (107 titoloj!) de la alia maldekstrula esperantista societo: Monda Asembleo Socia, el kiu, mi revis ĉeteci kelkajn.

Mi vidis diversajn membrojn de SAT, pli malpli konatajn.

La ĉeestintoj estis plimulte francoj, nur 25 % venis de aliaj landoj!

12 hispanoj, unu serbino, nur 4 britoj.

Unu paro venis el... Aŭstralio! Jen fervoraj SAT-anoj!

Kaj, la lastan tagon, mi vidis alveni en la kongreson viro, el Islando (ja kun la Islanda flago sur la sako), kiu estis la vera socio de *Zamenhof*! Halucine! Mi ne scias ĉu intence, (tion mi



konjektas), li iom kokete helpis la naturon, nu... kaj la barbo, kaj la lipharoj, la vizaĝo, la okulvitroj, eĉ la kalvaĵo estis tiuj de *Zamenhof*! Kaj eble la plej mirinda afero estis, ke neniu ŝajnis mirigita pri tio.

La venonta kongreso okazos en *Nitra*, Slovakio.

Verkita de **Rolland PLATTEAU**

## El Amieno

# Agad-raporto el Amieno

### ★ Akcepto de Miguel Ángel González Alfonso dum Junio

*Miguel* vizitis Amienon kiel finan restejon en Francio.

Pliaj informoj en posta resumaĵo...

### ★ La kursoj

- En la 1-a grupo, *Jean-Louis GRÉAU* kaj *Henri BON* duope gvidas la kurson per la metodo **BEK** por la plej novaj lernantoj (kvin personoj). Kursoj okazas lunde de la 15-a h.30 ĝis la 17-a horo en ĉambro "*Aubré-tias*" en Salŭelo.

- En la 2-a grupo, la kursoj okazos ĉiuj aŭde je la 15-a h.30. La hejma loko ŝanĝiĝos laŭ la monatoj.

- En la 3-a grupo (la plej altnivela)

la kursoj okazos en la domo de *Maryse* de la 14-a h.30 ĝis la 16-a h.30. Grupo laboranta per Esperanto: parola kurso pri la gazeto "Monato". Ĉiu membro laŭvice pretigas artikolon, kiun li aŭ ŝi prezentas parole al la grupo.

### ★ La salono "Agora 2014" en Amieno

Post longa tempo de ne-partopreno, kelkaj membroj de "*Espéranto 80*" deziris ĉi-jare senprokraste ĉeesti tiun salonon. Precipe starigis la ĉeeston de nia asocio je la evento *Jean-Claude ROY* kaj *Cyrille DÉCOUTURE*.

Dejoris *Jean-Claude* kaj *Cyrille*, *Catherine LÉVÉQUE*, *Jean-Louis GRÉAU* kaj

*Agnès JULLIEN*. Pli pri tiu salono vi scios pli poste en la artikolo verkita de *Jean-Claude*.

### ★ Ĝenerala membrokunveno

La 25an de Oktobro okazos la Ĝenerala Membrokunveno.

Ĝi estas grava ĉar ĝi sekvas la malaperon de nia amiko Daniel **DEVIS**.

Ni devos firmigi por tiu ĉi jaro (2014-2015) la novajn asocio-funkciojn.

Redaktis kaj tradukis *Cyrille DÉCOUTURE* laŭ raportoj de *Marie-Thérèse FRENOY*, *Bernadette MANIER* kaj *Jean-Louis GRÉAU*

## El Amieno

## Miguel Ángel GONZÁLEZ ALFONSO



Kadre de Eŭropa prelegturneo, "Espéranto 80" akceptis Miguel Ángel GONZÁLEZ ALFONSO dum preskaŭ tuta semajno en Amieno.

Vendredon la 6an, Miguel estis akceptita de Pascal CADART kaj Agnès JULLIEN en la stacidomo de Amieno. Pascal veturigis lin al la domo de Françoise kaj Luc JAISSON en Plachy-Buyon. Ili akceptis lin tie en sia domo.

La vesperon de tiu tago, Miguel prelegis pri sia lando: Kubo.

Li prezentis al ni la vivon en Kubo kaj ties lastajn evoluojn. Li parolis pri vendo de domoj, monoj kaj aliaj ŝanĝoj nun disvolviĝantaj.

Sabaton la 7an estis Distra Sabato-

evento en Plachy-Buyon, kie ĉiuj membroj kaj Miguel trapasis bonajn momentojn.

Dimanĉon la 8an, li vizitis kun Agnès la 10an kuzo-renkontiĝon de la familio de Agnès.

Lundon la 9an, li vizitis la kvartalon Saint-Leu en Amieno... sub pluvo... Mardon la 10an, li vizitis eko-muzeon pri la gaŭloj "Samara" \*.

La saman tagon mardon la 10an okazis la dua grava evento en Salŭelo. Estis kunporto kaj disdono de manĝo. Miguel ankaŭ parolis pri sia esperantistiĝo kaj pri sia vivo sine de la movado kaj rilate al sia familio kaj al siaj najbaroj.

Merkredon la 11an, li vizitis kun esperantistoj la katedralon de Amieno, kaj la tombejon "La Madeleine".

Li foriris al Germanio jaŭdon la 12an. Ni devis resendi liajn tre multajn valizojn al Germanio per speciala sendo, ĉar ili ne estis transporteblaj kun li en aŭtomobilo.

**Konkludo de Bernadette MANIER**

Li estas agrabla amiko, kiu interesiĝis

pri Amieno kaj aprezis tiun urbon. Li jam planis reviziti Françoise kaj Luc.

Li estis multe tuŝita, tial ke la grupo ne nuligis sian ĉeestadon pro la ne malfrua kaj subita malapero de nia amiko kaj tiam organizinto Daniel DEVIS.

La grupo tamen opinias, ke ses-taga gastigo kaj akcepto de esperantisto postulas imponan organizon... Eĉ se tamen ĉio disvolviĝis glate!...

Dum sia tuta ĉeesto, Miguel ricevis multajn donacojn. Liaj pakajoj tiom ŝveligiĝis, ke ni devis elpensi kaj realigi koston sendon de la tuto.

Tiun demandon starigis ankaŭ la kunorganizanto Yves NICOLAS. Kaj tion ni devos estonte iel pripensii.

Redaktis kaj tradukis  
Cyrille DÉCOUTURE laŭ raportoj de  
Marie-Thérèse FRENOY kaj  
Bernadette MANIER

\* Kompletiga noto de Cyrille DÉCOUTURE: Sciu, ke la nomo "Samara" devenas el la pranomo de Amieno "Samarobriva".

## El Amieno

## "Mia AGORA"

Ĉi-jare ni ne mistrakis la rendevuon de la asocioj en Amieno!

Okazis tiu evento la sabaton 20-an de Septembro en la centro de la urbo.

333 asocioj troviĝis kunigitaj kaj "Espéranto 80" partoprenis. Pri nia lastfoja partoprenado mi ne plu memoras, eble estis antaŭ 3 au 4 jaroj.



Ni decidis pri tiu denova partopreno

en Junio; sed pro la forpaso de nia amiko Daniel, la grupo starigis tiun trafan demandon:

"Kial do partopreni? Neniu en la grupo povos organizi novan kurson por komencantoj! Sed ni partoprenu! Kaj la interesiĝantoj lernos mem la lingvon. Ne mankas kursoj en la reto." Kaj do ni aliĝis! Kostis 30 eŭrojn (20 por partopreno kaj 10 por kurento!).

Kaj feliĉe ni havis kurenton! La ekrano kaj la filmo pri nia movado allogis. Kaj la tutan tagon ni aŭskultis KD-on de sveda grupo, kiu kantas en Esperanto. Kaj mi multe aprezis mian Agora-on! Dank'al Catherine kaj Cyrille, nia budo estis plenplena de multaj diversaj priatentindaj aĵoj: libroj por infanoj kaj plenkreskuloj; kaj kelkfoje mi legis tekstojn por montri kiel legiĝas

tiel eksterordinara kaj tiel stranga lingvo.

Ni distribuis multajn faldfoliojn de "Espéranto-France", por klarigi kiel tiu mensa konstruaĵo vivas kaj staras.

Ni aliris al niaj pasantaj klientoj ĉiam sammaniere per tiu simpla frazo: "Est-ce que vous connaissez la langue internationale espéranto?": Ĉu vi konas la internacian lingvon Esperanto?

Kaj la respondo estis preskaŭ ĉiam la sama: NE! Kaj jen la komenco de longa klarigado kaj de ege interesa dialogo inter pasantoj kaj ni. Ni renkontis multajn scivolemajn junulojn kaj paroĵojn de plenkreskuloj. Mi kelkfoje legis sur vizaĝoj la pens-aĵojn kaj demandojn: "Tiu lingvo ekzistas en la mondo kaj mi ne sciis pri tio?!" Mi havis tiun saman demandon antaŭ 30 jaroj!

Iam mi diskutis kun iu; kaj samtempe, 4 metrojn for de nia budo, iu virino spektis la filmon per grandegaj senmovaj okuloj... kaj kun la buŝo malfermita! Kaj mi tre milde iris al ŝi, por starigi la saman demandon kaj altiri ŝin al la budo... kaj ŝi malkovris kaj ŝi miregis... kiel aliaj personoj!

Mi diskutis ankaŭ kun tre afabla juna paro de gestudentoj: la viro italdevena, la virino meksikdevena. Mi parolis al ili nur en Esperanto por klarigi kaj ili legis la vortojn sur miaj lipoj por pene kompreni...<sup>\*</sup> kaj ili komprenis! La virino registris min,

dum mi legis tekston. Ni kolektis nur 8 retadresojn de personoj, kiuj deziras ricevi aliajn sciigojn pri la lingvo kaj pri la loka grupo! Sed ne gravas! Kompreneble ni rekontakto ilin kaj invitos ilin por pli longe interkonatiĝi.

### Resume

Ege riĉa evento por mi; kaj mi esperas: ankaŭ por nia grupo! Ni plu fosu... tiom da homoj bedaŭrinde ne scias! La politikistaro kaj la ĵurnalistaro ne povos ĉiam kaŝi la veron.

Redaktis Jean-Claude ROY

<sup>\*</sup> Kompletiga noto de Cyrille DÉCOUTURE: Miaflanke mi provis alparoli "klientojn" senpere en Esperanto, por iel miaopinie allogi ilin. Tio ne vere funkcias, kiam oni ne jam kaptis ilian atenton antaŭe per uzo de la franca lingvo. Ekzemple, mi ne rekomendas la uzon de tiu ĉi simpla rekta demando – verdire tute internacia!: "Esperanton ĉu vi konas?" En Francio, ni povus ricevi baton! Feliĉe tion mi ne travivis!

## El Araso

# Agad-raporto el Araso (sommero 2014)

<sup>60</sup> **Somere** la kursoj paŭzas sed ne la kursanoj. Taŭga sezono por verde sunbruniĝi!!!

<sup>60</sup> **15an de Junio**, Arlette kaj Edmond PLUTNIAK kun du bretonaj amikoj, amike teumis kun Andrei KOROBEINIKOV ĵus antaŭ lia brila koncerto kun la nacia orkestro de Lillo (90 muzikistoj). Andrei konfirmis, ke li pretas prepari tute specialan koncerton por la venontjara jubilea 100-a UK en Lillo. Ni nun esperu, ke la responsulo de la Artaj programeroj de la kongreso rapide kontaktos lin.

<sup>60</sup> **Dum 10 tagoj** Marianne DUNLOP feris en Krimeo kaj kontaktis tie plurajn esperantistojn. Ŝi raportos pri siaj travivaĵoj aŭtune al la klubanoj.

<sup>60</sup> **Julie**, Fabrice LEMAIRE ĉeestis la Someran Esperantan Studadon (SES) en Slovakio, kune kun 250 esperantistoj el trideko da landoj.

<sup>60</sup> **Pluraj Arasanoj** daŭre regule legas kadre de la Esperanto-Sumoo kaj ricevas belajn kolorajn diplomojn el Japanio.

<sup>60</sup> **Aŭguste**, Roland PLATTEAU partoprenis la SAT-kongreson en Dinan. Notindas, ke en la majajunia revuo "Sennaciulo" de SAT aperis tuta kolora paĝo por alloge informi pri la venonta novembro 26a Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage. La anonco aperis ankaŭ en "La Sago", la revuo de SAT-Amikaro.

Ni sukcesis aperigi informon pri tiu grava evento en "L'Écho de la Polonia", bela kolora revuo legata de ĉiuj poldevenuloj en Francio. La sidejo de La Maison de la Polonia de France troviĝas en Liévin, rue Espéranto (kiun ni inaŭguris en 1988 dum nia Federacia Kongreso!).

<sup>60</sup> Pierre OLIVA (Prezidanto de la Provenca Federacio) kun la edzino Nicole vizitis dum unu plena

monato nian belan Nord-Francian regionon cele al trafa venontjara volontulado dum la UK. Ili amike kunmanĝis kun Arlette kaj Edmond PLUTNIAK, kiuj ĉiĉeronis ilin en Le Touquet.



<sup>60</sup> **14an de Septembro**, planita partopreno en la tute renovigita Forumo de Asocioj. La morgaŭan tagon rekomenciĝos la semajnaj lundvesperaj kursoj en Office Culturel d'Arras 61, Grand'Place.

Raportis Edmond PLUTNIAK

## El Araso

# Lingvo-salono en Béthune

La 24an de Majo 2014 okazis en Béthune la unua salono pri

lingvoj, organizite de la urbo, de la Domo de Eŭropo, kaj ĉefe de la loka

Rotary-klubo. Partoprenis kelkaj membroj de la Arasa Esperanto-



klubo: *Arlette kaj Edmond PLUTNIAK, Marianne DUNLOP, Jacky RAMON, Jeannine RAULT, Richard SZLASKI kaj Fabrice LEMAIRE.*

Pli ol tridek budoj ebligis al la vizitantoj malkovron de lingvoj kaj de ĉio, kio rilatas al ili. Ankaŭ okazis kelkaj prelegoj kaj aktivis atelieroj (pri kaligrafio, tradicia trinkado de la ĉina teo, ktp.).

Eblis informiĝi pri la ĉina lingvo, pri la japana, la nederlanda, la pola, la angla, kaj kompreneble pri Esperanto. Aliaj budoj prezentis ankaŭ Eŭropon, la agadon de la *Rotary*-klubo, lingvajn staĝojn aŭ lingvoĉelajn vojaĝojn, prilingvajn trinkejojn, prilingvajn librojn el la urba biblioteko aŭ el librovendejoj ktp.

La Arasanoj estis sufiĉe multaj por

prezenti Esperanton ĉe la budo, kaj ankaŭ ĉie, kie eblis ekbabili pri Esperanto en la salono: kelkaj aliaj ekspoziciantoj estis scivolemaj pri Esperanto. *Edmond* ekrlatis kun oficialuloj, kiuj eble iĝos honorgastoj okaze de la venontjara UK en Lillo.

Raportis *Fabrice LEMAIRE*

## El Bulonjo-ĉe-Mar

# Agad-raporto el Bulonjo-ĉe-Mar

Ĉiu scias, ke Bulonjo situas ĉe maro, sed ĉu vi scias ankaŭ, ke bela rivero, "*La Liane*", fluas en Bulonjo?


Ĝi ebligas al junuloj kanui kaj kajaki. La sufiĉe grava asocio "*canoë-kayac*" organizas konkursojn en Bulonjo kaj

partoprenas en alilokaj konkursoj, ofte sukcese.


Raportis *Marie-Jeanne LINE*

## El Dunkirko


# Agad-raporto el Dunkirko

 **Merkredon la 2an** de Julio okazis la 22-a ĝenerala membrokunveno de nia asocio, en la kutima kunvenejo "*Brossolette*".

**Septembro** rekomenciĝis la kursoj (dufoje monate) en la kutima kunvenejo "*Brossolette*" (je "strato Zamenhof").

 **Merkredon la 17an de Decembro**, la klubanoj kune vespermanĝos en Dunkirka restoracio okaze de la tradicia Zamenhof-festo.

 **La 17an de Septembro** okazis nia informkunveno.


 **La 15an kaj 16an de Novembro**, kelkaj klubanoj partoprenos la 26an Rendevoon de *Stella-Plage*.

Raportis *Xavier VILAIN*

 **Merkredon la 24an de**

## El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

# Agad-raporto el LVE


 **Ĉiumonataj renkontoj**  
Ĉiun trian jaŭdon de la monato (krom julie kaj aŭguste) je la 18h30 en la Tenisa Klubo F.O.S. en *Villeneuve-d'Ascq*. Mi esperas, ke venontjare, partoprenos pli da homoj, precipe pli da junuloj, ĉe niaj monataj rendevuoj.

19h45, [Instruisto *Claude LONGUE-ÉPÉE*].


*Lille*: ĉiun mardon, en la Kvartala Domo en la centro de *Lille*, [*Katja BOEN*].

*Oignies*: konversacia rondo ĉiumarde, [*Richard SLASTCHKY*]

*Universitato Lille III*: ĉiun mardon, je la sama horo por komencantoj kaj komencintoj, kaj ek de Novembro dufoje monate je la sama horo lunde por progresantoj. [*Michel DECHY*].

 **Someraj staĝoj**  
De la 7a ĝis la 11a de Julio, de la 18h30 ĝis la 20a: 5 seancoj por malkovri la lingvon. Tamen por la unua fojo deponit 14 jaroj, tiu staĝo ne okazis pro manko de lernantoj. Same de la 25a ĝis la 29a de Aŭgusto; jam aliĝis iu lernantino, [*Michel DECHY*].

Kutime, kelkaj lernantoj daŭrigas la lernadon dumjare en la Universitato *Lille*.

 **Ĉiusemajnaj kursoj**  
Verŝajne, ni proponos la saman programon kiel lastjare: *Bersée*: ĉiun lundon de la 18h15 ĝis la

## Universitato pri Libera Tempo

Almenaŭ 10 foje vendrede matene dum 1h30 por komencantoj kaj sekve por progresantoj. Mi esperas gvidi 2 nivelajn kursojn la venontan lernojaron [Michel DECHY].

## La klubo ĉe Interreto [www.lve-esperanto.org](http://www.lve-esperanto.org)

Multaj informoj pri la diversaj agadoj de nia klubo aperas en tiu bonega informilo.

Sufiĉe ofte, homoj kaj ĵurnalistoj kontaktas nin post vizito de tiu "fama" adreso, kies zorgantoj estas *Katja BOEN* kaj *Xavier DEWIDHEM*.

## Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Esperanto

Ĉiujare, la elementaj lernejoj (*Anatole FRANCE* kaj *Pablo PICASSO*) invitas min. Mi kutime proponas almenaŭ 3 seancojn po 1h30. (Prezentado de Esperanto, kurso pri matematiko en Esperanto kaj fine japana sorobano). Kiel en 2013, kune kun la urbaj asocioj, kiuj zorgas pri instruado en elementaj lernejoj, sama prezentado en lernejo Toulouse Lautrec, tamen ĉifoje mi aldonis plian seanon por sperti kaj prepari la futurajn agadojn,

kadre de la "novaj lernejaj ritmoj". Plie, nia asocio *LVE* ricevis monhelpon por tiu agado. Denove oni povas ĝoji pri tiu "valorigo" de Esperanto-instruado.

La 29an de Aprilo, samideano el Kubo prelegis en la *MRES* pri "Kubo dum la XXI-a jarcento". Dankegon al *Katja BOEN*, kiu gastigis lin, al *Claude LONGUE-ÉPÉE*, kiu ĉiĉeronis nin en Lillo, ankaŭ al *Bart DEMEYERE*, kiu ĉiĉeronis nin en Bruĝo, pruntedonante biciklon al ĉiuj el la kvinopo.

Dankon al ĉiuj membroj de nia klubo, kiuj partoprenis kun li la belan promenadon okaze de la "Flandraj Ardenoj".

La 15an de Majo, mi denove prelegis en la urbo *Ronçq*, ĉiam invitata de la asocio "Nord Madame" (Asocio nur por virinoj en diversaj urboj de la Norda regiono).

## FEI ekzamenoj en la MRES

Ili okazis sabaton postagmeze la 21an de Junio. Estis nur po 2 kandidatoj por la du unuaj niveloj. Nuntempe, laŭ la novaj reguloj, kandidato povas tuj trapasi la duan gradon.

## Budoj okaze de diversaj aranĝoj

Esperanto-budo ĉe la stratbazarado de Lillo, la 6an kaj 7an de Septembro, dank' al *Vincent PEIGNEZ*.

Foiro pri Asocioj, la 14an de Septembro en la vastega sporthalo "Palacium" en *Villeneuve-d'Ascq*, de la 10a ĝis la 18a, bonega momento por reklami kaj varbi!

Festivalo pri la Bildstrioj en *Lys-lès-Lannoy*: la 8an kaj la 9an de Novembro 2014 [Michel DECHY].

Dankon al ĉiuj deĵorantoj kaj vizitantoj!

## Lille2015, Universala Kongreso okazos en Lille

Ni (edzino + mi mem) partoprenis la ILEI-konferencon en Montevideo (Urugvajo), kaj poste la U.K.-on en Bonaero, kie ni retrovis nian amikon *Xavier*.

Bonega prezentado de Lillo dum la U.K. de Bonaero, vendredon posttagmeze, kaj emocia transdono de la "verda standardo" dum la Solena Fermo.

Legu pli da detaloj en la "vorto de la prezidanto"!

Reportis *Michel DECHY*

## El Valencieno

# Agad-raporto el Valencieno

**La 7an de Junio** okazis la 37a jara renkontiĝo de la grupoj el *Valenciennes* kaj *Solre-sur-Sambre*. Ĉeestis 22 gesamideanoj, kiuj pasigis tre agrablajn momentojn en la restoracio "Le Viennois" en *Coulsole* (inter *Maubeuge* kaj *Beaumont*).

**La 8-an de Aŭgusto** forpasis, en Valencieno, nia amiko *Charles LERICHE*, 87-jaraĝa.

De longatempе li estis aktiva membro de la klubo *Valenciennes-Espéranto*, membro de la Norda Federacio kaj, siatempe, sindikata militanto kaj asocia responsulo.

**La 1an de Oktobro** rekomencigis la kursoj de Esperanto en la Domo de Asocioj de Valencieno por la 1a grado, kaj la 4an por la 2a grado.

Raportas *Jean-Marc FRATARD*

## El Valencieno

# Alexandre Denis ABEL DE PUJOL

Ĝis 1811, la oficialaj dokumentoj (Aktoj de la ŝtato, registroj, ekspoziciaj katalogoj...) konas nur unu ulon, poste pentriston, nomitan **ABEL**

kaj proprenomitan *Alexandre Denis*. Tiam, iĝinta Rompremiita, la artisto ŝajnas agnoskinda de sia patro, la eksprovosto de Valencieno *Alexandre*

*Denis Joseph PUJOL DE MORTRY*, kiu rajtigas lin aldoni "DE PUJOL" al sia nomo **ABEL**. Kaj kiam li naskiĝis en Valencieno la 30an de Januaro 1785,

eksteredzeca infano, estas en Douai, kaj sub falsa nomo, ke lia patrino **Marie Anne DEBARALLE** registriĝis lin. Kiom da ombroj komence de vivo, kiu anonciĝis tiel brila!

lia naskiĝa urbo : li estas la unua lernanto de la junaj Akademioj kiu famkonigis Valencienon ! Tamen lia restado en Romo estas ege mal-longa : alveninte en Januaro 1812, li reformis el tie ekde Oktobro, "atakate de aflika malsano, kiu transiĝis en konsumiĝon" (raporto de **Guillon LETHIERE**, 7an de Oktobro 1812). Li ja estis devigita lasi en Parizo (la reglamento de la Vilao **MEDICIS** estis nekontestebla) du knabojn naskitajn en Novembro 1808 kaj Aŭgusto 1811, kaj sian vivkunulinon **Marie Claudine LEGRAND** (kun kiu li edziĝas en 1814).

preĝejo **Sainte-Elisabeth, rue du Temple** (1828), "**Achille de Harlay, dans les barricades le 12 mars 1588**" (Muzeo de Versailles, 1843)...

Akceptite en Aŭgusto 1835 kiel membro de la Francia Instituto, **ABEL DE PUJOL** plenumas, en 1845, por sia naskiĝurbo, vastegan pentraĵon (hodiaŭ detruitan) "**La ville de Valenciennes encourage les Arts**". Oficiro de la Honora Legio en 1853, li tamen vidas sian vivfinon mal-heligita pro elreviĝoj (detruo de lia ĉefverko, la plafono de la muzeo **Louvre** en 1856), familiaj problemoj kaj prisanan zorgoj. Vidviĝinte, li edziniĝas sian lernantinon kaj amikininon **Adrienne GRANDPIERRE-DEVERZY**



Mem-portretoj en 1806 kaj 1812

La debuto de **ABEL** estis malfacila : senpatra infano, en urbo el kiu necesis fuĝi post la liberiĝo de la aŭstra jugo, li ŝuldas al sia avino **Marie-Joseph WAUSTRUD**, "metilernantino" ĉe **Antoine GILIS** en 1739-1740, sian unuan artan formiĝadon. Reveninte en Valencienon, li eniras en la Akademiojn de la urbo, fonditajn de **PUJOL DE MORTRY**, kaj lokumas sin sub la gvidado de **MOMAL**. En sia dekkvinjariĝo, li rapide progresas, kaj ekde 1803, li foriras al Parizo, provizite de rekomena letero de **PUJOL DE MORTRY** por **DAVID**.

Fronte al tiu malfacila majstro, fore de siaj familianoj, sen monrimedo, **ABEL** malcedas al la senkuraĝiĝo kaj devigas la destinon, ke ĝi ebligu al li prezenti al **DAVID** komponaĵon : "**Philopoemen fendant du bois et reconnu par son ami**", kiu favorigas al li esti senkoste akceptita ĉe **DAVID**. Post nelonge, pensio de la urbo Valencieno bonstatigas lin. Akceptita ĉe la Salono en 1808 danke al la "**Clémence de César**", li gajnas en 1810 Duan Rompremion, li konatigas sin kiel pentristo de ŝildoj (!), kaj brile konfirmas siajn bonegajn inklinojn obtenante en 1811 la Unuan Rompremion : "**Lycurgue présentant aux Lacédémoniens l'héritier du trône**". Oni imagas la akcepton, kiun faris al li



La ateliero de Abel de Pujol far **Adrienne Marie-Louise GRANDPIERRE-DEVERZY**

En 1814, la "**Morto de BRITANNICUS**" (Muzeo de Dijono), ekspoziciata ĉe la Salono, havigas al li Unuaklasan Medalon. Postvenas multaj mendoj : "**Le Martyre de Saint Étienne**" por la preĝejo de **Saint-Étienne-du-Mont** (Salono de 1817), la "**Renaissance des Arts**" por la ĉefŝtuparo de la muzeo **Louvre** kaj la "**Vierge au Tombeau**" por **Notre-Dame de Paris** (Salono de 1819), la freskoj de la kapelo **Saint-Roch** por la preĝejo **Saint-Sulpice** (1820-1822), kiuj indigas lin esti "Kavaliro de la Honora Legio", "**Joseph expliquant les songes**" (Muzeo de Lille, 1822), la grizajlaj pentraĵoj de la **Borso** (1825), tiuj, sur laĵoj de **Volvic**, per kiuj li novigas por la altaro de la

(Marto 1856) kaj mortas en Parizo la 28an de Septembro 1861. En 1865, liaj cindroj estas solene translokigitaj en Valencienon, kie monumento ŝuldata al la talentoj de la arkitekto **Edmond GUILLAUME** kaj de la skulptisto **Gustave CRAUK**, rememorigas al la promenantoj de la tombejo **Saint-Poch** la honestan kaj talentan artiston, kiu malfermis al la lernantoj de la Valencienaj Akademioj la vojon al la eterna Urbo...

Verkis **Jean-Claude POINSIGNON**  
Tradukis esperanten **Jean DIETRICH**

Elkoran dankon al S-ino **Maryse HOUDART**, Prezidantino de la Genealogia Asocio "Flandrio-Henegovio" (Genealogio kaj Historio), kiu afable permesas al ni traduki kaj publikigi eltirajojn rilatantajn al la vivo kaj historio de famaj homoj en Henegovio, publikigitajn en la "aparta numero 30a datreveno. Oktobro 2013".

# Rakonto de sperto en Esperantujo SOMERA ESPERANTO STUDADO en SLOVAKIO

Pasintan Julion, mi partoprenis en mia unua eksterlanda aranĝo: la **Somera Esperanto-Studado** (t. n. SES), kiu okazis en la urbo *Nitra*, en Slovakio, de la 12a ĝis la 20a de Julio. Tiam SES okazis la okan fojon; do la organizanta skipo estas nun tre sperta. La ĉeforganizanto estas *Peter BALAŠ*.

## Ek al *Nitra* !

Mi veturis per trajno ĝis la flughaveno de *Beauvais-Tillé*, kaj ekflugis rekte al Bratislavo. La flughaveno de *Beauvais-Tillé* ne estas facile alirebla (sufiĉe malproksima de Parizo, aldonu unu horon kaj duonon de trajno-veturado, kaj poste, iru per buso aŭ takso, ĝis la flughaveno). Alia maniero iri al Slovakio estas ekflugi de *Paris-Charles DE GAULLE* kaj surteriĝi en Vieno. De tie oni povas facile iri ĝis Bratislavo per buso (unu horo de veturado sufiĉas). De la ĉefa stacidomo de Bratislavo, oni povas atingi per buso la urbon *Nitra* laŭ unu horo kaj duono. *Nitra* estas ĉarma studenta urbo kun multe da universitatoj, kaj precize SES okazis en studenta loĝejo de la universitato Konŝtantina Filozofa.

## SES, serioza kursejo

La programbroŝuro de la aranĝo estas pli dika ol tiu ĉi ekzemplero de la Norda Gazeto. Oni povis fari multajn aferojn! Sed, kiel indikas la nomo, SES estas ĉefe evento kiu ebligas studadi Esperanton. Ĉiutage, de la 9a ĝis la 13a, okazis Esperanto-kursoj: kvar horoj de kursoj (kun nur mallonga paŭzo de dek kvin minutoj, ne pli !) atendis la partoprenantojn dispartigitajn laŭ ilia nivelo (de absoluta komencanto ĝis C1/C2). Dum la semajno, kiu antaŭis la komencon de SES, la partoprenantoj ricevis per Interreto demandaron pri sia nivelo kaj la unuan vesper-

on ili trapasis etan gramatikan teston. Eblis trapasi la KER-ekzamenojn dum la aranĝo.

## Posttagmeze : multe da okupiĝoj

De la 14a horo ĝis la 19a, eblis aŭskulti prelegojn, sportumi, spekti filmojn, partopreni en diversaj atelieroj (pri muziko, dancado, esperantaj kvizoj, manaj artokupiĝoj kiel origamoj, ktp.). Tiu programo estis ĉefe proponita de la SES-partoprenantoj, invititaj kontribui. Tabulo situanta en la ĉefa koridoro ebligis elekti okupiĝojn kaj trovi la lokon. Mi elektis ĉefe prelegojn por malkovri aliajn lingvojn: la slovanan, la polan, la rusan, la korean, kaj eĉ la "klingonan", t.e. artefaritan lingvon kreitan por la televida serio *Star Trek*; ĝi sonas tre strange!

## Post la vespermanĝo : la koncertoj

Ĉiuvespere, altkvalita muzika koncerto estis proponita. Dum la unua t. n. "nacia vespero", ni spektis slovanan folkloran koncerton de la tuta familio **HLBOCKA** (la gepatroj kaj la sep infanoj estas muzikistoj!). Kaj poste, jOmO (mi ne prezentos lin...), Kimo (*Kim J. HENRIKSEN* el Danio, kantisto kaj akordionisto), Kaŝi (*Carsten SCHNATHORST*, germana mirinda kantisto, gajn akompanite de piano kreis etoson), **NO-PROBLEM** (Ĉeĥa popolmuzika grupo, kiu komencas kanti Esperante), kaj "Martin kaj la talpoj" (sveda roka kantisto kun liaj muzikistoj).

Lastan vesperon, la spektaklo estis farata de la partoprenantoj (ĉi-foje t. n. "internacia vespero"), kiuj proponis kantojn, dancojn, skeĉojn kaj poemojn.


## Nokte : festumu en la diskoteko aŭ babilu en la gufujo

Post la spektakloj, oni povis daŭrigi la

## ENHAVO

### NIAJ MEMBROJ VERKANTAS

* Somera Esperanto Studado en slovakio	p12
* Inter "La Nigra Lando" kaj "La Besta Nigro"	p13
* "La selekto de betsemoj"	p16
* 99a Universala Kongreso en Bonaero invito al Lillo parolado de X. Dewidehem	p18
* Atentigo de la redaktoro	p19



feston. La impona trinkejo iĝis diskoteko. Kelkaj kutimis enlitiĝi sufiĉe malfrue matene (nur kelkajn horojn antaŭ la komenco de la kursoj), aliaj preferis babilu ie ajn en la SES-ejo aŭ en la gufujo – pli kvietaj lokoj.

Post la spetaklo mi kutimis iri trinki kofolaon (speco de koka-kolao pli dolĉa, trinkebla nur en Slovakio kaj en Ĉeĥio) kaj babilu iomete kun samideanoj.

## Ekskursoj

Du tuttagaj ekskursoj estis proponitaj la saman tagon. Oni povis elekti inter la ĉefurbo Bratislavo kaj *Banská Štiavnica* (urbo konata pro minejoj de arĝento). Ankaŭ estis organizitaj tri nesamtempaj duontagaj ekskursoj: *Nitra*, *Topoľčianky* (fama pro la vinproduktejo kaj la burgo el la 15-a jarcento), kaj la arbareto *Mlyňany*.

Mi vizitis *Nitra*. Ni traveturis per turisma trajneto la centron de la urbo kaj la kastelan lokon, poste ni vizitis la katedralon kaj la sinagogon (kiu estas nun uzata kiel muzeo pri

holokosto kaj kiel koncertejoj). Finfine teo-gustumado atendis nin.

Mi ankaŭ partoprenis en la ekskurso al Bratislavo. Matene ni vizitis la kastelon de *Devín*. Ni manĝis en bona restoracio fronte al la parlamento. De tie la vidaĵo al la tuta urbo estas mirinda. Poste ni iris al la kastelo de Bratislavo kaj finfine vizitis la centron de la urbo.

Ĉiam la komentoj de la ĉiĉeronoj estis alesperantigitaj.

### Ĉu mi denove partoprenos?

Mi tre ĝuis la kursojn, la eblecon paroli esperante kun homoj el 28 landoj, la amikecan etoson (post la



Kompreneble mi planas denove partopreni venontjare, kaj konsilas al vi malkovri tiun indan renkontiĝon. Tiu aranĝo ne estas multekosta (tia aranĝo pri la angla kostus almenaŭ kvinoble). Plie oni ricevis donacojn (sakon kun la materialo por studi dum la semajno, kiu enhavis romanon, kompaktan diskon de la grupo **NOPROBLEM**), kafojn, teojn dum la paŭzoj, lokan vinon post unu el la

koncerto. La feliĉuloj, kiuj festis sian naskiĝtagon ricevis ankoraŭ pliajn donacojn. Tre bone prizorgataj estis la partoprenantoj al kiuj oni ebligis manĝi vegetare aŭ kun viando. Lastan tagon, ĉar mi foriris antaŭ tagmanĝo, oni eĉ preparis al mi manĝosaketon.

Ankaŭ plaĉis al mi tiu lando. Antaŭ ol atingi la SES-ejon mi devis peti informojn aŭ helpojn de Slovakio. Ĉiam ili estis afablaj kaj helpemaj. Rimarkante, ke mi ne parolas la slovakon lingvon, ili uzis la anglan por komuniki kun mi. Tamen mi aĉetis surloke iomete da materialoj pour eklerni ilian lingvon, mi uzos ankaŭ la retpaĝaron *Slovaĉe.eu*, kaj mi celas iomete scipovi la slovakon okaze de miaj venontaj vojaĝoj al Slovakio, des pli ke en 2016, la Universala Kongreso okazos en la urbo *Nitra*!

Verkis Fabrice **LEMAIRE**



rehejmenigo ni plu rilatas per Fejsbuko kaj interŝanĝas fotojn), la mirandan riĉecon de la programo.

## Traduko

# INTER "LA NIGRA LANDO" KAJ "LA BESTA NIGRO"



### Enkonduko de Claude LONGUE-ÉPÉE

En la pasinta numero de nia "Norda Gazeto", mi aperigis artikolon pri "La kuraciloj kaj la kuracadoj de niaj praavoj". Ĝi estas verkita de Paule **LERNAULD**, kiu estis antaŭ 63 jaroj la juna instruisto de mi, juna knabo, kaj kiu estas membro de la nuna "Rondo de la Memorantoj", kreita en mia vilaĝo Bersée, kaj eldoninta broŝuron "*Si Bersée m'était conté*". En tiu broŝuro estas artikolo mia, kiu asertas, ke "En mia antaŭmilita junaĝo, la *Bersée*-anoj, se ili ne estis kultivistoj aŭ metiistoj, estis laborantaj, aŭ laborintaj, aŭ laborontaj, ĉu en la minejo de *L'Escarpelle*, ĉu en la sukerrafinejo de *Béghin* en *Thumeries*".

Hodiaŭ restas en la minejo senmovaj ŝaktoj kaj ŝtonaj ŝutmontoj ("*Terrils*"), silentaj atestantoj de mortinta mineja aktiveco. Hodiaŭ same, en *Thumeries* ĉesis la svarmado de la betkamionoj kaj restas nur kelkaj maŝinoj enpakigantaj blankan sukron faritan en aliaj fabrikoj.

**Fernand DESBONNEZ** estas maljunulo, membro de nia "Rondo de la Memorantoj". Li fakte estas esceptulo, kiu estis laboranta, kaj en la fundaj galerioj de la minejo de *L'Escarpelle*, kaj sur la fornoj regenerantaj la ostokarbon

(“Besta Karbo”: “Noir animal”) utiligitan por senkolorigi la rafinotajn kradan sukerojn.

*Fernand DESBONNEZ* estas iomete pli maljuna ol mi, kaj ambaŭ ni studis dum unu aŭ du jaroj en la sama baza lernejo.

*Fernand DESBONNEZ* estas la aŭtoro de la ĉi-suba artikolo, kiu ankaŭ aperis en la broŝuro “*Si Bersée m’était conté*”. Ĝi temas pri tiuj du historiaj fundamentaj aktivecoj de nia regiono : la terkarbo kaj la betsukero.

Sed, kiel *Fernand*, ankaŭ mi aktivis en tiuj du Nordaj industrioj; en la fundo de regiona mino mi staĝis, dum miaj porinĝenieraj studoj, kiel helpanto de geologo... dum unu monato (ne longtempe!); en sukerfarejoj mi inĝenieris kaj estris, en Francio, Magrebo, Balkano, Sovet-Unio... entute dum pli ol 50 jaroj (multe pli longtempe ol en minejo!).

Ĉio tio klarigas, kial mi iom kunlaboris kun mia amiko *Fernand* por la redaktado de la ĉi-sekvanca artikolo, kiu estas por mi... tre regiona... tre faka... tre emociiga!...

Kondukis *Claude LONGUE-ÉPÉE*

## Artikolo de *Fernand DESBONNEZ*

Mi estis 16-jara, dum la milito, kiam unuafoje mi mal-suprenlifitis en la fundon de la “*Fosse Bernard*” en *Frais-Marais*. Tie mi travivis 16 jarojn en la fundo (“*Au Fond*”), unue kiel minhelpanto (“*Galibot*”), kaj poste kiel ekstraktanto (“*Abatteur*”).

Mi poste supreniris sur la surfacon (“*Au Jour*”), por travivi 18 jarojn ĉe la “*Fosse Gayant*” en *Ostricourt* kiel pesisto-ekspedisto (“*Basculeur-Expéditeur*”). Pri tiuj 32 jaroj el mia vivo, mi konservis multe da memoroj... inkluzive de silicozo je 25 %!

Mi konis ankaŭ la sukerkampanjojn en *Thumeries*, la difuzilojn (“*Vases de Diffusion*”), en kiuj mi premegis la betrobotaĵojn (“*Cossettes*”), ilin energie surtretante.

Ĉu en *Frais-Marais*, ĉu en *Ostricourt*, ĉu en *Thumeries*, mi spertis la laŭ-postenajn deĵorojn, la 56-horajn semajnojn, la perbiciklajn vojirojn dum ĉiutage du horoj por iro kaj reveno.

Kaj mi konis ankaŭ, dum la frukto-sezono, kaj post mia labortago, la kromajn horojn (“*Les heures sup*”) de la fruktoplukanto en la paŝtejoj aŭ de la helpanto en la agrikulturaj laboroj. Oni kapablis – kaj ofte oni devis – labori pli... por perlabori tre iomete pli!!

Mallonge dirante, mi konis la sorton de multaj laboristoj de *Bersée*, el kiuj pluvivas bedaŭrinde malmultaj!

Tiam la biciklo estis vojaĝilo por 30 ĝis 40 ĉiutagaj kilometroj dum ĉiaj veteroj; ĝi estis multe pli ol turismilo aŭ sportilo.

Tiam ni estis la “*La Salajrata Laboristaro*”, ni estis “*La Proletaro*”... Niaj memoroj estas kelkfoje amaraj; sed ili estas ankaŭ ofte tio, kion oni nomas “*Bonaj Memoroj*”.

## La perbiciklaj vojiroj: samaj rimedoj por iri al la minŝakto aŭ por iri al la sukerfabriko

Nepriis alveni akurate ĉe la laboro. Ĉiam bicikle, dumnokte lumigate per acetileno-lampo, ofte dum abomena vetero, sub pluvo, sub neĝo, sur glaci-pluvo, fronte al vento.

Ni engrupiĝis laŭ skipoj (bonege por certigi bonan trejnadon kaj por firme teni la spiritstaton!).

Kaj, se okazis, ke mi ekpiediris sur la deklivoj de *Monté Couvé*, de “*La 4 Bonaj Dioj*”, aŭ de *Mons-en-Pévèle*, mi ne memoras pri tio... Kaj neniam mi konfesos tion!

Dum la milito, la nuraj rimedoj por ripari la pneŭmatikojn kaj la aertubojn estis improvizitaj rimedoj (“*Moyens de Fortune*”).

Oni supermetis du pneŭmatikojn por ŝtopi la truojn. Oni ŝtopis la aertubojn per glado... Dankon al *Jacques LEMAIRE*, kiu ĉiam bone min sen-paneigis. Mi memoras lian ĉiaman konkludon: “*Euch’ dis, cha ch’est du*

*vêlo!*”

Sur la minejo, ne estis bicikloparkejo. Niaj bicikloj estis lasitaj en la proksima trinkejo. La tenantino senpage pririgardis ilin. Ŝi ankaŭ iris ricevi niajn salajrojn (“*Quinzaines*”), ĉe la pagoficejo, dum niaj deĵoradoj.

Ŝi donis al ni la monon... elpreninte la koston de niaj eventualaj konsumentajtoj!

Ankaŭ sur la biciklo ni transportis la distribuitaĵojn de la mino (porkaĵojn, grasoĵojn, vinon, tabakon); kaj same la restaĵojn el ligno de ni en la fundo kolektitajn, por uzi ilin kiel brulaĵojn. Mi memoras esti transportinta sur mia biciklo 18 litrojn da vino (kio cetere estis pli ol dekofoje mia persona konsumo!).

## En la fundo de la mino

En la minoj de Nordo la karbovejnoj estis tre deklivaj (ofte 30 gradoj kaj pli!) kaj aparte malaltaj (proksimume inter 40 kaj 80 cm!).

En tiuj malvastegaj vejnoj oni devis en la polvo kaj la malvarmo – ĝenerale ventrokuŝe – manovri sian pneŭmatan vojborilon, perdonte nek sian ledan ĉapon (“*Barette*”) sur sia kapo, nek sian lampon (5 kg por elektraj lampoj). Por reveni ien, oni devis retropaŝi.

En la fundo estis ankoraŭ ĉevaloj; ili tien estis malsuprenigitaj unu fojon kaj ili resupreniris al la taglumo nur okaze de sia morto.



## La “*Briquet*”

Estis paŭzo por manĝeto (“*Le Briquet*”), tiel nomita laŭ la nomo de la homo, kiu sukcesis trudi al la minestraroj la principon de tia paŭzo. La higieno kompreneble postulis, ke oni lavu siajn manojn antaŭ ol manĝeti. Mi lasas la leganton diveni la efikan rimedon ĝenerale uzitan

por praktiki tiun nemalhaveblan higienajon!

Dum tiuj “*Briquets*” ni lernis la valson... Sur la turniĝajn platojn de la fervojoj por la karbvagonoj! Kaj depost tiu epoko mi neniam ĉesis valse ĉiufoje kiam tio eblis...

### La laboro kiun mi pleje malŝategis

Tio estas kiam ni devis, dum tuta posteno, interne de iu “ŝaktoputo”, sur la tegmento de la lifto (“*La Cage*”), revizii kaj ripari la gvidilojn el kverko de tiu lifto. La laboro fariĝis, laŭ nestabila ekvilibro, sub la senĉesa pluvado de la trasorbigoj el akvo.

### La akcidento en la fundo, dum kiu mi kredis, ke mi perdos mian vivon

Dum talusado (“*Remblayage*”) de ekspluatita vejno (“*Boyette*”), dum mi estis resupreniganta minlignaĵojn en tiu vejno, ĉi-tiu sterniĝis ĝuste malantaŭ mi, kun terurega disbruego, superŝutante mian lampon kaj lasante min en la mallumo, por resupreniri en la vejno; savite el la morto je kelkaj sekundoj!

### La strikoj en la minoj

Dum la milito, dum la okupacio, necesis aŭdaco kaj kuraĝo por manifestiĝi per lanteca aŭ kompleta striko.

Ĉiumaniere ni estis devigataj, per la forto de la “*Komandantur*”, relabori niajn strikhorojn, aŭ esti senditaj sur la rusan militfronton... Kompreneble sen iu ajn kontentigo pri niaj postuloj. Mi ankaŭ memoras pri rusaj militkaptitoj, kondamnitaj labori en la minfundo, kun nudaj piedoj, sen manĝeto... Kun kiuj mi oftege partigis mian manĝeton...

Ankaŭ estis, inter aliaj, la longa striko de 1948, kiam ni estis petitaj (jam!) “labori pli multe” por “restarigi Francion”. Tio estis la “Karbobatalo”. La striko estis tre severa, kun okupado de la minejoj far la armeo dum 6 semajnoj, kaj kun kelkaj rekvizicioj cele al la sekureco. Sed finfine ni sukcesis ekhavi kelkajn kontentigojn (plialtigon de salajroj, agnoskon de slicozo kiel profesia malsano).

### En sukerfabriko; en la “Difuzejo”

Tie mi laboris, dum la sukerkampanjo; en la difuzejo.

Tie la betoj, antaŭe senherbigite, senŝtonigite, senkotigite en la “lavejo”, kaj poste disrabotite laŭ maldikaj rabotajoj (“*Cossettes*”) en la radik-tranĉiloj (“*Coupe-Racines*”) – kiel “celeremolado” – estis traktataj en 10 aŭ 12 plurkubmetraj difuziloj (“*Vazoj*” el giso).

En tiu serio da 10 aŭ 12 difuziloj, la betrabotajoj estis kunpremataj per nia energia kaj obstina surtretado. Poste en la vazojn eniris akvo, kiun ni kontraŭflue cirkuligis, kaj kiun ni varmigis manovrante multegajn kraniojn, sur varmigiloj nomitaj “kaloridoniloj” (“*Calorisateurs*”).

La akvo ŝargiĝis per sukero, produktante la “*Verdan Sukon*” (“*Jus Vert*”), (tiel nomita ĉar ĝi estis tute nigra!). Kaj la betrabotajoj, kies sukero estis elĉerpita, estis premitaj por senakviĝi kaj fariĝi la betpulpaĵoj (“*Pulpes*”).

Tio estis laboro ĉiam refarita kaj laciga, en aero saturita de humideco kaj de odoroj. Tie maleblis paŭzi kaj “*Briquet*”-umi. Ni manĝis niajn panpecojn ne ĉesante dancadi en la betrabotajoj kaj manovri la kraniojn... Feliĉe, la sukerkampanjo daŭras nur proksimume tri monatojn...

Sed senĉese 7 tagojn ĉiusemajne kaj 24 horojn ĉiutage.

### En sukerrafinejo; ĉe la bestnigroformo (“*Fours à Noir Animal*”)

Male de la sukerfabriko, prilaboranta betojn, la sukerrafinejo, prilaboranta krudan kansukeron, aktivis dum la tuta jaro.

En tia fabriko la krudaj sukeroj, pli malpli rufaj, antaŭ denova prilaborado en kristaligejo, estis resolvitaj por fari siropon, kiu poste estis senkolorigitaj per besta nigro.

Tiu besta nigro – farita per kalcinado de bestaj forĵetajoj kaj ostoj – sorbis la kolorajn nesukeraĵojn el la siropo. Kaj poste ĝi estis regenerita en retortoj, en kiuj brulis la koloraj nesukeraĵoj, antaŭ ol rezervi denove.

Ĉirkaŭ tiuj regenerantaj formoj mi laboris dum pluraj monatoj. La tiea temperaturo – je 50°C – kaj la grasa polvo, kiu ĉiam englitiĝis en la

vestojn kaj surgluiĝis sur la haŭto, igis min bedaŭri multfoje la laboron en la fundo de la mino!!

### Adiaŭ al HBNPC! Adiaŭ al Béghin-Say! Adiaŭ al tiuj bildoj de nia regiono!

Jen!!

Estis al mi tre agrable paroli pri tiuj metioj, kiuj konsistigis mian vivon dum pluraj jaroj. Mi esperas esti interesinta la leganton kaj esti al li sensinginta la penigon de tiu laboro, kiun mi tamen vere ŝatis...

Mi malmulte konis la modernan “boregadan” (“*Havage*”) de la karbovejoj per la aŭtomataj “boregmaŝinoj” (“*Haveuses*”) faligantaj la karbon el ĝiaj stratumoj.

Mi tute ne konis la modernajn “kontinuaĵajn difuzilojn” (“*Diffusions Continues*”) de la sukerrafarejoj, nek la modernan senkolorigadon de la siropo per “senkolorigaj anjonaj rezinoj” (“*Résines décolorantes anioniques*”) de la rafinejoj.

Hodiaŭ la minejoj de “*Nord Pas-de-Calais*” estas fermitaj, lasinte en niaj pejzaĝoj nur siajn ŝtonamasojn – sur kiuj komencas verdi kreskaĵoj! – kaj lagojn sur siaj subfalintejoj (“*Affaissements*”).

Hodiaŭ betoj ne plu estas prilaborataj en *Thumeries*; kamenegoj kaj siloj malaperis.

Sed, kiam mi parolas pri “Tiu Tempo”, ĝi restas “La Bona Tempo”...

Verkis **Fernand DESBONNEZ**  
Alesperantigis **Claude LONGUE-ÉPÉE**

Ekzistas tradukaĵo de tiu artikolo ankaŭ en la *Bersée*-a pikarda dialekto. Vi povos legi ĝin, aĉetante la broŝuron “*Si Bersée m'étaît conté*”, verkitan kaj eldonitan de la “Rondo de la Memorantoj de *Bersée*”.

# SELEKTO DE LA BETSEMOJ

## Enkonduko de Claude LONGUE-ÉPÉE

En antaŭaj paĝoj de ĉi-tiu numero, mia amiko *Gaston DESBONNEZ* – membro kiel mi de la *Bersée*-a “Rondo de la Memorantoj” – priskribas detale sian laborviven en minejo kaj en sukerfarejo. Tio estas en du el la plej famaj industriejoj de nia regiono.

Nun mi lasas la parolon al *Jean HAVEZ* – ankaŭ membro de nia “Rondo de la Memorantoj”. Li parolos pri la rikolto kaj la pritrakto de la betsemoj. Tio ja estis unu el la plej reprezentivaj agrikulturaĵoj de nia regiono.

Enkondukis *Claude LONGUE-ÉPÉE*



## Artikolo de Jean HAVEZ

La beto – sukerbeto aŭ furaĝbeto – estas dujareca planto. Ĝi vivas du jarojn.

Oni povas rikolti la radikon post unu jaro, por eltiri el ĝi la sukerojn; aŭ ĝin replanti, por rikolti ĝiajn semojn post dua jaro de kreskado.

Nia regiono estis siatempe fakega pri la kultivado de tiuj “Semportiloj”...

Ekde mia infanaĝo, de miaj gepatroj kaj ĉefe de miaj onkloj, mi ĉiam aŭdis paroli pri betsemoj. Nia regiono *Pèvele* estis ties feŭdo. La distriktoj de *Pont-à-Marcq*, *Orchies*, kaj eĉ *Cysoing*, kultivis ilin jam en 1908; sur 1590 hektaroj da semportiloj, el entute 1720 hektaroj sur la tuta departemento.

Ĉi-rilate, la distrikto de *Orchies* estis estiĝinta la unua el Francio dum la 19-a jarcento.

En *Bersée*, Sinjoro *SIMON*, loĝante en *La Ricarderie* ĉe *Jean-Luc MOUCHON*, estis konstruinta laboratorion, por superregi la selektojn kaj

plibonigi la produktivecojn. Poste li delasis la landon. Sed li estis famega produktanto... Kaj li ne estis la sola!!...

Multaj konstruaĵoj starigitaj ĉirkaŭ 1880 priatestas tiun belan epokon. La vitraloj de la preĝejo de *Bersée* estis parte pagitaj de tiuj bonhavaj grandfamilioj.

*Florimond DESPREZ* estis tiuepoke jam fame konata. En agrikultura revuo, li konsiladis la kultivistojn, por sanigi, grundoplibonigi kaj dreni la grundojn, cele al plibonigo de la kultivado de tiu planto kapricema kaj malfacila.

## Tiu kultivado ŝtupigis laŭ du jaroj

La semadoj estis farataj, sufiĉe densaj, dum la printempo; kun traktarĝo inter la semvojoj je 22 ĝis

25 centimetroj por la du varioj sukeraj kaj furaĝaj.

Necesis poste kuraci ilin sufiĉe frue kontraŭ la afidoj; kaj ne atendi la fortajn malvarmojn, por eltiri la radikojn per senverŝila plugilo aŭ per fosmaŝino. La radikoj estis kolektataj pere de baskulĉaro kaj ensiligataj; kaj poste kovrataj per pajlo kaj iom da tero.

Kiam alproksimiĝis la vintro, necesis denove rekovi la silojn per 40 cm da kroma tero, por ŝirmi ilin kontraŭ la frosto... Ververa laboro de terajisto!!...

Kiam estis alveninta la printempo, oni demetis la kovrintan teron dum la tago. Tio estis la elsiligado. Tiun elsiligadon akompanis longa kaj senilaga laboro, por forigi la etajn radiketojn; kaj meti sur alian amason la selektitajn radikojn, por ilin ŝirmi kontraŭ la pluvo kaj la eventualaj frostetoj. Tion oni faris batalante kontraŭ la ekpluvegoj!...

Multaj *Bersée*-anoj konservas pri tiuj laboroj malbonan memoron. Ili sin ŝirmis malantaŭ ŝirmejoj nomitaj “*gluïères*”.

Kiam alvenis la bona vetero, post kiam oni estis metinta dikan dozon da sterko sur la grundojn, la ĉevaloj fundplugis kiel eble plej bone la teron per la elsarkmaŝino. Post tio, la replantado de la radikoj faratis per mallarĝaj plugiloj (uzitaj ankaŭ por replanti brasikojn).

La plej gravaj farmobienoj dungis brigadojn. La malgrandaj farmistoj kelkfoje altaskigis siajn plej aĝajn gefilojn.

Necesis tiri pezegan karbon el vimeno kaj taŭge enmeti ĉiun radikon en la fundon de





ĉiu truo. La plantaĵoj, metite laŭ interspaco je 50 cm sur ĉiu linio, estis poste sarkitaj ; unue kun ĉevalo ; kaj poste per pioĉeto.

### La plantoj finfine “startis”

Sed necesis poste batali kontraŭ la afidoj per rudimentaj rimedoj : kun la « Vermorel » el kupro sur la dorso, per nikitino kaj sen masko...

zorgoj por malhelpi la sengrajniĝon de la plantoj.

### La draŝado okazis, kiam la laboroj estis finitaj sur la kampoj

La malgravaj farmistoj uzis la “*éripeuse*”. Kun la elektro venis la “najlmaŝinoj”. Sed kiam alvenis la vaporo, post 1900, la draŝentreprenejoj utiligis la lokomobilon, kiu movis draŝmasinon.

ĝenerale venditajn pli multekoste.

Sed ni havis konkurencantojn ; ĉefe en Germanio. Ĉi-tiu startigis krizon en 1930. Miaj onkloj konservis sian rikolton sur la grenejo ĝis la sekvanta jaro ; la merkato tiam sintenis iom pli bone. La farmistoj ĵus instalitaj vendis laŭ malaltega prezo ; ili ja bezonis monon por pripagi la venontan sezonon. Sed la favora epoko estis finita. Sed tamen la semfirmaoj daŭrigis siajn serĉadojn.

Post la liberiĝo, la kadukiĝo pli-graviĝis. Oni parolis pri klimato tro malseka, pri la malsanoj. Estis malkovritaj pli favoraj regionoj ; unue la Pariza regiono ; sed ĉefe la sud-okcidenta regiono. Interalie en la regiono de *Agen*. Ekzemple, ĉe *KWS*: 80 hektaroj da plantaĵoj.

Tie, oni ne rikoltas ilin dum la aŭtuno. Oni surkovras la semitaĵojn per plasta tolaĵo. Oni riskas iun severan vintron aŭ iun fortegan ŝtormon. Oni traktas per grandaj ŝprucigmaŝinoj 28 metrojn larĝaj. Dum la sekvanta jaro, oni falĉas sur verdaj plantoj per falĉmaŝinoj. Oni kribras kelkajn tagojn poste. La suno ja estas pli varma ol en nia regiono ; kaj, se restas humideco, oni utiligas sekigilon.



La rikolto okazis ĉirkaŭ la komenco de Aŭgusto. Per falĉileto bone akriĝita. Oni bezonis helpojn : denove brigadojn, ne multe da knaboj. La tigoj, malfacile detranĉeblaj, estis oftege merititaj per gravaj tranĉvundoj.

La garboj estis ligitaj per sekalo (kies tigoj rompiĝis malpli ofte ol la tigoj de tritiko). Oni lokis tiujn garbojn sur etajn staketojn ; la malfacilego estis ke oni ne povis kovri ilin same kiel oni faras per la tritikgarboj. La pluvo kaŭzis oftajn difektojn.

Kiam la vetero estis seka, oni enstokigis tiujn garbojn... kun multe da

Kaj fine venis la “*Dizelo*” funkciaanta per petrolo. La kribromaŝinoj estis uzitaj por plibonigi la kvaliton de la semoj. Estas preciziginde, ke “*La Pévèle*” kultivis furaĝbetojn kaj sukerbetojn,

Sur la terenoj de *Bersée* kaj de *La Pévèle*, la semfirmaoj faras selektadon tre zorgoplenan. Ili estas “ĉe la pinto” de la progresoj. Ili daŭre liveras por la sukerfarejoj kaj por la distilejoj.

Sed ni, la kultivistoj, ni estis devigataj orientiĝi al aliaj kulturoj.



Verkis **Jean HAVEZ**  
Alesperantigis **Claude LONGUE-ÉPÉE**



# 99a Universala Kongreso en Bonaero invito al Lillo – parolado de X. DEWIDHEM

Sabaton la 2an de Aŭgusto 2014 – Bonaero, Argentino  
Solena fermo de la 99a Universala Kongreso de Esperanto



altvaloran, altprezan al la prezidanto de la LKK de Lillo. (Aplaŭdoj) Tiu gesto honorigas ŝin. Mi deziras tre danki kaj gratuli al ŝi – la finnino Synnöve MYNTTINEN! (Aplaŭdoj)



Estimataj gesinjoroj,  
*Madame la Représentante de l’ambassade de France en Argentine,*  
Sinjorino Rerezentantino de la ambasadoro franca en Argentino,  
Karaj gekongresanoj,  
*Che boludos y boludas, (Ridoj)*  
Karaj geomikoj,

Kiel prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la 100a Universala Kongreso de Esperanto mi unue volas danki al la tuta Loka Kongresa Komitato de la 99a Universala Kongreso de Esperanto. Jen en Bonaero mia unua vojaĝo ekster Eŭropo. Mi tute aliĝas al la vortoj de nia prezidanto *Mark FETTES* pri la boneco de tiu kongreso. Malgranda laŭ la nombro de aliĝintoj, sed granda laŭ la etoso, laŭ la ĝuo, laŭ la emocio.

Tial al vi, Argentinanoj, mi volas diri: multan dankon pro tiu kongreso! *Muchas gracias por todo lo que hicieron! (Aplaŭdoj)*

Tradicie okazas fine de la Universalaj Kongresoj aŭkcio. Kaj tradicie oni vendas la kongresnumeron 1 en la fino de tiu aŭkcioseanco por la venonta kongreso Ĉi-jare tiu kongresnumero estis vendita je la prezo 350 €. Kaj la aĉetintinoj anoncis, ke ŝi donas tiun kongresnumeron



Ni estis en Bonaero kaj ni ĝuis. Ni ĝuis ankaŭ pagante niajn manĝojn kaj tiel plu. Mi simple montru al vi la monbileton je 5 Argentinaj pesoj. Kial? Sur ĝi estas *José de SAN MARTIN*, kaj mi legu la priskribon – tion vi povos kontroli poste. *José Francisco de SAN MARTIN* estis la patro de la Argentina patrujo; li estis la liberiginto de Argentino, Ĉilio kaj Peruo; li naskiĝis en *Yapeyú* kaj li mortis en 1850 en urbo nomita *Bulonjo-ĉe-Mar* en Francio. (Aplaŭdoj)

Jen bona transiro, jen bela ponto inter Bonaero kaj *Bulonjo-ĉe-Mar* kaj Lillo. Do venu en *Bulonjon-ĉe-Mar*, venu en *Lillon*! Ne por morti kiel *José (ridoj)*, sed por plene vivi kaj ĝui la 100an Kongreson.

Mi estis iomete – nur iomete – emociita ricevante la flagon Esperantan. Jam en 2002 mi kun amikoj revis pri jubilea kongreso de Esperanto en Lillo. Jen post 13 jaroj realiĝos tiu revo. Dankon al UEA kaj ties estraro pro via fido! (Aplaŭdoj)

Ni ĉiuj invitas vin



por partopreni en tiu 100a Universala Kongreso de Esperanto en Lille, norda Francio, laŭ la paŝoj de *Zamenhof* en Bulonjo.

Ĝi estos tre oportuna urbo, tre ĉarma urbo, kaj estos en plej bona kongresejo. Ni celos memorfesti la unuan Universalan Kongreson de Esperanto. Kaj nia fundamenta volo estas malfermi la Universalan

Kongreson de Esperanto al la ĝenerala publiko, por ke Esperanto brilu ankaŭ sur la ekstera mondo! (*Krioj kaj aplaŭdoj*)

“Ĉu niaj nepoj nin benos?” Ni benis la partoprenintojn de la unua Universala Kongreso. Ĝi estis vera ĉefmomento de nia historio esperantista. Mi deziras, ke ĉiuj vi, ĉiuj ni partoprenu multnombre la 100an Universalan

Kongreson. Ĝi estu plej sukcesa kongreso, ĝi estu plej elstara en nia memoro kaj al la monro al ekstero. Nin benu post kelkaj jardekoj niaj nepoj pri la 100a Universala Kongreso.

Por ke ĝi estu sukcesa, necesas vi ĉiuj. Karaj gekongresanoj, karaj Esperanto-parolantoj, karaj Esperanto-lernantoj kaj Esperanto-simpatiantoj, venu, kongresu, ĝuu, kaj ni kunaj elmontru la pluvivecon de Esperanto tra la mondo! Karaj gekongresanoj, ek al la centa! (*Aplaŭdoj*)

Paroladis Xavier **DEWIDHEM**

La filmo de tiu parolado estas videbla en Youtube kaj en la retejo de Lille2015: [www.lille2015.fr](http://www.lille2015.fr)



## El la redakcio Atentigo de la redaktoro

Karaj legantoj. Mi supozas, ke finiĝis viaj eventualaj ferioj. Kaj mi esperas, ke ĉi tiuj por vi agrable disvolviĝis. Certe iuj el vi partoprenis Esperantajn manifestaciojn – aparte la Universalan Kongreson en Argentino. Ili tiel faris provizojn de belaj memoraĵoj, kiuj povos interesi nian legantaron kaj tial meritas raporteton en nia Norda Gazeto.

Mi ne dubas, ke vi estas pretaj kuraĝe alfronti la tuj venontan novan laboraron; kaj ke vi estas pretaj partopreni kiel eble plej efike diversajn agadojn utilajn al la prospero de nia lingvo.

Mi denove volas insisti aparte pri tiu punktoj:

**Unue:** kiel legantoj de nia revuo, ne forgesu, ke vi estas ankaŭ samtempe

ĝiaj redaktantoj. Mi atendas viajn raportojn, tekstojn kaj artikolojn. Mi atendas viajn rimarkojn, komentojn, eventualajn kontestojn kaj kritikojn pri la enhavo de nia revuo.

**Due:** okaze de la rekomenciĝo de la lernojar, kaj kadre de la “Ekster-programaj aktivadoj” (*Activités périscolaires*) deciditaj de la ministerio pri instruado. Mi instigas, ke pluraj el niaj legantoj, laŭ siaj eblecoj, klopodu enskribiĝi en la baza lernejo de sia vilaĝo aŭ urbo, por gvidi – al *CM1* kaj *CM2* – inicajn lecionojn de Esperanto. Tio estu korelativa agado kun la agado farata al la ministerio pri instruado por “*Espérance au Bac*” de *Espéranto-France* kaj SAT-amikaro. Kaj tio montru nian kapablon proponi homojn povantajn prepari ekzamen-

erojn kaj korekti ilin. Personoj mi gvidos tiajn kursojn en *Bersée* en nia *Lille*-a grupo.

**Trie, kaj memkompreneble:** ja ne necesas rememorigi pri la eminenta evento de la venonta jaro! Enskribiĝu, por partopreni la centan Universalan Kongreson de Esperanto en “*Lille2015*”... Ne nur pro ĉeesti la manifestaciojn sed ankaŭ, laŭ viaj eblecoj, por viviĝi tiujn manifestaciojn: prelegoj de la “*Kleriga Lundo*” aŭ de la “*Internacia Kongresa Universitato*”; ĉiĉeronado de la ekskursoj en la regiono; akceptado de la kongresanoj, disdonado de konsiloj pri la urbo, planoj, restoracioj, ktp. Laŭ alia temo, mi rememorigas al niaj federacioj, ke mi decidis rezigni miajn postenojn en nia

federacio: de ĝia reprezentanto en la Komitato de *Esperanto-France*; kaj de ĉefredaktoro de nia revuo. Miaj misioj finiĝos venontjare post la Junia eldono de la Norda Gazeto. Mi tiam 84-jariĝos.

Kaj mi petas, ke sin prezentu al nia federacia estraro volontulo por repreni la torĉon!...

Jes! Mi scias; oni rimarkigos al mi, ke mi jam plurfoje rediris la samajn aferojn!...

Mi ja konsideras – ĉiukaze mi esperas –, ke la rediro rememorigos kaj fortigos miajn dirarojn...

Claude **LONGUE-ÉPÉE**

## Programo 2014-2015 de la kastelo Greziljono



**24a de Okt. – 3a Nov. 2014**

### AŬTUNE la ferioj

La Esperanto-kastelo kore invitas al staĝo por infanoj kaj ĉiuj aĝoj. Alveno ekde vendredo 24a de Oktobro, foriro ĝis lundo 3a de Novembro. Tri KURSOJN givdos *Stano MARČEK* el

Slovakujo, *Jean-Luc KRISTOS* kaj *Bert SCHUMANN*. Pri infanoj zorgos instruistino *Ansofi MARKOV*. Infanoj kunportu Haloven-kostumon. *Elisabeth BARBAY* faros kun vi braceletojn el elastaĵoj vidu:

<http://dl.free.fr/pw6yA9iSB>

Kantu kanzonojn kun *Jean-Luc* aŭ kantu ĥore kun la koruso **Interkant**.

<http://gresillon.org/autune>

**30a de Dec. – 4a Jan. 2015**

### Jarfina FESTego Silvestra FESTeno

Eblas partopreni partatempe aŭ nur la

Silvestran vesperon. Ĉiutage animadoj: partoprenaj atelieroj de kantado, de jonglado, de ŝminkado.

Kun la teamo de *Jean-Manu* vi pasigos momentojn neforgeseblajn: spektaklojn de klaŭnoj, de magio. Muziko, koncertoj.

<http://gresillon.org/jarfino>

Adreso: *MCE Grésillon – Saint-Martin d'Arcé – 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU*

Telefono: +33 (0)2 41 89 10 34

Retpoŝto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

Reĵeto: [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

## Asociaj kaj redakciaj informoj

### FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD

**Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):**

*Michel DECHY*

65 Allée Crémaillère

59650 VILLENEUVE-D'ASCQ

Tel : 06 16 98 41 02

[mdechy@esperanto-nord.org](mailto:mdechy@esperanto-nord.org)

### Sekretario:

*Katja BOEN*

51 Avenue du Maréchal Leclerc

59130 LAMBERSART

Tel : 03 20 92 31 36

[cboen@esperanto-nord.org](mailto:cboen@esperanto-nord.org)

### Kasisto:

*Xavier VILAIN*

Résidence L'Alcyon – Apt. 41

90 rue du Maréchal Joffre

59240 DUNKERQUE

Tel. 06 70 65 93 29

[xvilain@esperanto-nord.org](mailto:xvilain@esperanto-nord.org)

### Tarifo de kotizoj:

13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.

Per ĉeko al la ordono de "Fédération Esperanto-Nord" sendota al la kasisto.

### BULTENO "NORDA GAZETO"

#### Ĉefredaktoro:

*Claude LONGUE-ÉPÉE*

320 rue des 4 Bons Dieux

59235 BERSÉE

Tel. 03 20 59 28 80

[plongueep@free.fr](mailto:plongueep@free.fr)

#### Federacia reĵeto:

<http://www.esperanto-nord.org>

#### Konstantaj korespondantoj:

##### ★ Amiens

*Cyrille DÉCOUTURE*

[kontakt@esperanto80.org](mailto:kontakt@esperanto80.org)

##### ★ Arras

*Edmond PLUTNIAK*

[edmond.plutniak@free.fr](mailto:edmond.plutniak@free.fr)

##### ★ Boulogne

*Marie-Jeanne LINÉ*

[mjline@esperanto-nord.org](mailto:mjline@esperanto-nord.org)

##### ★ Dunkerque

*Elise DEPLA*

[edepla@yahoo.fr](mailto:edepla@yahoo.fr)

##### ★ Lille-Villeneuve

*Katja BOEN*

[cboen@esperanto-nord.org](mailto:cboen@esperanto-nord.org)

##### ★ Valenciennes

*Jean-Marc FRATARD*

[jmfratard@esperanto-nord.org](mailto:jmfratard@esperanto-nord.org)

#### Enpaĝigado:

*Cyrille DÉCOUTURE*

10 chemin des Oiseaux

76270 FESQUES

[kontakt@esperanto80.org](mailto:kontakt@esperanto80.org)

Tel: 06 78 80 78 45

#### Kontrolantoj-korektantoj:

*Claude LONGUE-ÉPÉE*

[plongueep@free.fr](mailto:plongueep@free.fr)

*Pascal VILAIN*

[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

#### Presado, enkovertigo, sendado:

*Richard VALET*

Rue du Boulenriez 59235 BERSÉE

[rf.valet@wanadoo.fr](mailto:rf.valet@wanadoo.fr)

*La teksto de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 25-a de Novembro 2014.*

#### Partoprenis je tiu ĉi numero

*Michel Dechy, Edmond Plutniak, Claude Longue-Épée, Roland Platteau, Cyrille Découture, Bernadette Manier, Thérèse-Marie Frenoy, Jean-Louis Gréau, Fabrice Lemaire, Marie-Jeanne Liné, Xavier Vilain, Jean-Marc Fratard, Jean Dietrich, Richard Valet.*